La monreformo de Wörgl 1932/33

„Dum en la tuta mondo la ekonomia vivo lamiĝis per la internacia monstriko, tiu urbestro eltiras sian mizeriĝintan komunumon el la apatio per la monreformo de Wörgl laŭ la ideo koncerne liberan monon de Silvio Gesell" – tiel kaj simile eŭforie la internacia gazetaro raportis en la 30aj jaroj pri la kiel libera mono de Wörgl ankoraŭ mondskale konata moneksperimento.

Kio estas la esenco de tiu monreformo, per kiu la urbestro Michael Unterguggenberger volis „doni signalon al la mondo"? Kial tiu agado en Wörgl kontraŭ la mizero ankoraŭ hodiaŭ aperas kiel instrua ekzemplo en universitatoj de la tuta mondo? Kio okazis tiam en la "malgranda Tirola foirvilaĝo"?

La monda ekonomia krizo, kaŭzita en 1929 per la borsa kolapso en Usono, trafis komence de la 1930aj jaroj ankaŭ Eŭropon kaj kun ĝi la Aŭstrian ekonomion. Kaj speciale severe ĝi trafis Wörgl. Per la konstruo de la fervojo dum la 19a jarcento tiu komunumo, ricevinta en 1911 la titolon de foirloko, evoluis de kamparana vilaĝo al regiona ekonomia centro kun industrio kaj metiaro.



An Alle! № 2703

Langsam umlaufendes Geld hat die Welt in eine unerhörte Wirtschaftskrise und Millionen schaffender Menschen in unsägliche Not gestürzt. – Der Untergang der Welt hat (rein wirtschaftlich gesehen) seinen furchtbaren Anfang genommen. – Es ist Zeit, durch klares Erkennen und entschlossenes Handeln die abwärtsrollende Wirtschaftsmaschine zu retten, damit die Menschheit nicht in Bruderkriege, Wirrnisse und Auflösung getrieben werde.

Die Menschen leben vom Austausch ihrer Leistungen. Der langsame Geldumlauf hat den Leistungsaustausch zum großen Teil unterbunden und Millionen arbeitsbereiter Menschen haben dadurch bereits ihren Lebensraum im Wirtschaftsgetriebe verloren. – Der Leistungsaustausch muß daher wieder gehoben und der Lebensraum für alle bereits Ausgestoßenen wieder zurückgewonnen werden. Diesem Ziele dient der Arbeitsbestätigungsschein der Marktgemeinde Wörgl:

Er lindert die Not, gibt Arbeit und Brot!

La ekonomia malprospero kaŭzis, ke ĉiam malpli da mono cirkulis. La vendomerkatoj kolapsis, sekvis ĉesiĝo de la produktado kaj senlaboreco. La celulozfabriko fermiĝis, la cementindustrio reduktis la produktadon, kaj kaŭze de la elektrigo de la fervojo ankaŭ tie multaj laboristoj maldungiĝis.

En 1932 en tiu regiono 1500 homoj estis senlaboraj, la foirloko Wörgl kun siaj 4 200 loĝantoj havis 400 senlaborulojn – de kiuj 200 ne plu ricevis ŝtatan subvencion kaj devis esti prizorgataj de la komunumo. Sed la komunuma kaso malplenis, repageblis eĉ ne la interezoj por la kredito de 1,3 milionoj da ŝilingoj por la konstruo de la mezgrada lernejo.

Michael Unterguggenberger.

Kiel do elveni el tiu mizero? Dum tutaj familioj elmigris el Wildschönau al Brazilo, volis tie krei sian estontecon kaj fondis Dreizehnlinden, dum tri junuloj furiozis en Hopfgarten ekbruligante incendion kaj murdante por akiri monon, la urbestro de Wörgl trovis kreivan eliron: Ekzistis sufiĉa laboro – nur mankis la mono por pagi ĝin. Do la Wörgl-anoj mem presis sian monon.

Politika majstraĵo

En tiu senespera situacio Michael Unterguggenberger kaj lia libermerkata grupo de Wörgl konceptis programon por la agado kontraŭ la mizero en Wörgl, por kies realigo estis instalata superpartia komisiono por sociala prizorgo. Tie kunlaboris per la paroĥestro Matthias Riedelsperger ankaŭ reprezentanto de la katolika eklezio. La aktuala mizero kunigis la homojn malgraŭ kontraŭaj ideologioj – la komunuma konsilantaro faris ĉiujn decidojn unuanime.

Wörgl cirkuligas la monon

Por efektivigi la agadon kontraŭ la mizero la komisiono por sociala prizorgo eldonis monvaloratestilojn en la valoro de unu, kvin kaj dek ŝilingoj. Laŭ la ideo de la malgrandiĝanta mono de Silvio Gesell la monata senvaloriĝo je unu procento sekurigis la cirkuladon. Per gluado de kvitancmarkoj la papero gardis sian plenan valoron. La unuprocenta imposto eniris la fonduson por la malriĉuloj. Kiel garantion la komisiono por sociala prizorgo deponis la valoron de la eldonitaj laborvalorpaperoj en ŝilingoj ĉe la loka Raiffeisenkaso, forte ligita al realigo de la agado. Ŝanĝkotizo de du procentoj malhelpis, ke oni tuj reŝanĝis la laborvalorpaperojn en ŝilingojn.

La enplanita monimposto montras efikon

En julio 1932 la komunumo komencis realigi konstruprogramojn. La laboristoj estis pagataj per laborvalorpaperoj, faris aĉetojn en magazenoj de Wörgl, kiuj siaflanke liveris siajn impostojn – plej ofte eĉ kun konsiderindaj ŝuldpagoj – al la komununa kaso, kaj jam denove disponeblis mono por nova konstruado. Ĉiu evitis esti devigata pagi la malpliigon kaj rapide pluendonis la paperojn.

Monvalorpapero de Wörgl.

Dum tiuj kontraŭmizeraj laboroj oni investis en 1932 proksimume 102 000 ŝilingojn en infrastrukturon kiel asfaltadon de stratoj kaj konstruadon de kanaloj au de skisaltejo, printempe en 1933 denove proksimume 80 000 ŝilingojn por la konstruo de ponto super la rivero

de Wörgl kaj la kreado de migradvojoj kaj turisma infrastrukturo.

La konstruprogramo entenis inter aliaj alkonstruon al la komunuma muelejo kaj multajn stratriparojn en Wörgl.

Oni ankaŭ investis en turisman infrastrukturon: Printempe de februaro 1933 la skisaltejo estis inaŭgurata. Dum la libermona konstruprogramo oni faris ankaŭ 1,2 kilometrojn longan piedvojeton en la romantikan Aubach-ravinon kiel someran turisman atrakcion. La najbara komunumo Kirchbichl komencis en 1933 per la libera mono de Wörgl la konstruon de marĉa strandbanejo.

Dum la 13,5 provmonatoj de la monekspérimento proksimume 100 homoj estis okupataj, parte rekte per la konstruprogramoj, parte en subkontraktaj entreprenoj. La nombro de la senlaboruloj malaltiĝis en Wörgl je 16 procentoj, dum ĝi kreskis en Aŭstrio je 19 procentoj.

Averaĝe 5490 ŝilingoj cirkulis en formo de laborvalorpaperoj. Do estis po loĝanto nur 1,3 ŝilingoj en libera mono. La Nacia Banko samtempe elspezis 158,76 ŝilingojn pokape. Ĉiu

Urbestro Michael Unterguggenberger (la dua de maldekstre) kun la kuratoroj de la agado kontraŭ la mizero D-ro Georg Stawa (maldekstre), paroĥestro Matthias Riedelsperger (dekstre) kaj la komunuma sekretario Rudolf Winkler.

oficiala ŝilingo peris en la provtempo vendon de varoj en la valoro de 8,55 ŝilingoj. Kontraŭe unu ŝilingo de libera mono ebligis jare ĝis 73 ŝilingoj de socia produktaĵo; tion kalkulis Thomas Wendel en sia diplomlaboraĵo.

Fritz Schwarz, tiutempa atestanto de la monekspérimento de Wörgl, faris en sia en 1951 aperinta libro „Das Experiment von Wörgl" la kalkulon, ke la averaĝe 5490 cirkulantaj ŝilingoj de libera mono cirkulis en la 13,5 monatoj 464 foje (416 foje po jaro) kaj tiel konstatis entute uzon de 2547360 ŝilingoj. Schwarz alkalkulis per tio la moviĝon de la paperoj surloke – do de la komunumo al la laboristo, al la butikisto, al la metiisto, al la pograndisto, al la komunuma kaso ktp. – do la lokinternan cirkuladon de la paperoj aldone al la reiro en la komunuman kason.

eksĉefministro Edouard Daladier, en 1935 la amerika poeto Ezra Pound. Gazetaraj raportoj respeguligis la mondskalan ĥon. En Ameriko Prof. Irving Fisher volis batali kontraŭ la ekonomia krizo en 1933 per *Stamp scrip* laŭ la ekzemplo de Wörgl. La 10an de

Pagtago: La salajroj de la laboristoj estis pagataj per laborvalorpaperoj.

D-ro Silvio Unterguggenberger, filo de la urbestro Michael Unterguggenberger enkondukinta la liberan monon, kalkulis en sia kontribuo al la hejmregiona libro pri Wörgl (aperinta en 1998) surbaze de la nombroj de 416 transiroj de mano al mano jare kaj averaĝe 5490 ŝilingoj en 13,5 monatoj entute uzon de 2547360 ŝilingoj dum 1932/33, kio egalvalorintus en 1998 al aĉetpovo de 63684000 ŝilingoj. Konvertite en eŭroj tio egalus hodiaŭ al aĉetpovo de proksimume 5 milionoj da eŭroj.

Konstruita per libera mono: la Müllnertal-ponto (= ponto super la muelista valo).

La sukcesrecepto de la monreformo de Wörgl do estis la rapida cirkulado de la regione valida kuponvaluto.

Naciekonomiistoj, politikistoj kaj artistoj interesiĝis pri la libera mono de Wörgl. En 1934 venis la franca marto 1933 oni parolis en la Uson-amerika senato pri la libera mono de Wörgl. La eŭropskale aktiva movado por libera ekonomio observis la okazaĵojn en Wörgl same kiel la Aŭstria Nacia Banko kiu ekde la komenco vidis en ili danĝeron por sia moneldonmonopolo. Ĉar en 1933 pli kaj pli da Aŭstriaj komunumoj sekvis la ekzemplon de Wörgl – en januaro 1933 Kirchbichl komencis la konstruon de strandbanejo per la malgrandiĝanta mono de Wörgl - kaj volis batali kontraŭ la ekonomia krizo per la eldonado de libera mono, la Nacia Banko malpermesigis en 1933 la monekspérimenton per interveno ĉe la aŭtoritatoj. La protesto de Wörgl ĉe la juĝejoj restis vana.

La redakcio de *Esperanto aktuell* dankas al la Unterguggenberger Institut (Unterguggenberger Straße 3, A-6300 Wörgl, www.unterguggenberger.org, retadreso ui@snw.at, telefono +43/650/8311183), kiu prizorgas la heredaĵon de tiu parto de la urba historio de Wörgl kaj permesis la publikigon de la artikolo kaj de la fotoj.
Ni aparte dankas al la estrino de la Unterguggenberger Institut kaj organizantino de la *Wörgler Freigeldjahr 2007*, Veronika Spielbichler, pro la alsendo de la fotoj el la arkivo, kaj al AEF-estraranino Mag. Helga Farukuoye, kiu tradukis la tekston.